


la verda stelo



ESPERANTO
NEDERLAND

SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO

decembro 2007



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72

retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. +3150 525 00 86

retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouver
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouver@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alterman jaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo
Wil van Ganswijk-Vlasblom
retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

3 ... Klubkunvenoj, naskiĝtagoj

4 ... Pri la nordo

11 ... Feriaj travivaĵoj

13 ... Malferma Tago UEA

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2008

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van

ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. ESPERANTO NEDERLAND te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00

Klubkunvenoj

januaro

- 10 vivanta gazeto
24 la filmo *Gerda Malaperis*

februaro

- 7 Esperanto-poemoj
21 jarkunveno

marto

- 6 ikonoj – *Wil van Ganswijk*
20 ludvespero

aprilo

- 17 gastpreleganto

majo

- 1 ne okazos!!
15 pri Ubuntu – *Johan Swenker*
29 kune manĝi

- ŝanĝoj rezervitaj –

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia
retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

januaro

- 4 W. van Ganswijk-Vlasblom
13 G. Lanooy-Nijlusing
27 Ineke Emmelkamp
30 A.W. van der Veen

marto

- 24 E.J. Begeman



februaro

- 11 H. van Kappen
17 A.A. Bellekom
18 S. Kok-Czeswinska
28 L. Staghouver

aprilo

- 1 T. Bulk-Beenen
6 P. van Kappen-van de Kamp
17 M.K. Heide

Naskiĝtagoj

Pri la nordo

6 septembro 2007

FAMILIO BEHR dankis Wil pro la karto, kiun sendis la klubo post la forpaso de nia membro *s-ro Behr*.

Neoficiale informita, Wil hazarde eksciis, ke ŝi iĝis honora membro ankaŭ de ILEI. Pro tiu okazintaĵo ŝi regalis nin per bongusta kukaĵo.

Johan ricevis retmesaĝon el la Nord-Orienta Poldero de juna virino, kiu intencas verki

artikolon pri Esperanto. Ni opinias, ke ŝi intervjuu ges-ojn Balk, kiuj antaŭ ne longe transloĝiĝis al Emmeloord.

Johan sciigos ilin pri tio.

Wil opinias, ke pro la venonta malferma vespero ni pridiskutu tekston sendotan al lokaj gazetoj. Ineke opinias, ke en tiu teksto ni atentigu pri la 93-a *Universala Kongreso* en Roterdamo.



Dum kelkaj tagoj Ineke gastigis brazilan knabinon, kiu dum duona jaro studos en Groningen. La gepatroj de *Nadija* parolas Esperanton bone, dum ŝi ankoraŭ estas iom malpli sperta. Ŝi fojfoje partoprenos nian kunvenon. Ineke donacas al Nadija kelktempan

abonon de La Verda Stelo.

Dum la pasintaj monatoj Koos kaj Frans plibeligis la retan kurson kaj iom adaptis ĝin. Ĉiuj lecionoj nun havas sondosierojn. La rezulton oni povas admiri je <http://pingveno.nl/cursus>. Intertempe ĉe Koos anoncis sin la 90-a kursano.

Dum la ferioj Johan (kun Hanneke kaj Remco) metis kverkpargeton sur la plankon de kelkaj partoj en sia loĝejo. Luit feris kun Monica en la sudo de Limburgo, kaj li montris kelkajn fotojn de li faritajn. Ineke ferias nun. Ŝi interalie partoprenos kelkajn Esperantorenkontiĝojn. Koos kaj Frans feris en Svisio. Ili vizitis i.a. la faman monton *Matterhorn*, sed pro nebulo oni preskaŭ vidis nenion.

Wil antaŭe jam raportis pri sia interesa ŝipveturo laŭlonge de la marbordo de Norvegio.

20 septembro 2007

ĈEESTIS KROM nia honora gasto *Joeri Smolders* ankaŭ la nova membro *s-ro Harm Roeters*.

La lastajn du jarojn preskaŭ neniu aperis dum la malferma vespero de la klubo. Verŝajne pro tio, ke la lokaj gazetoj ignoris kaj ne publikigis tiucelan anoncon. Wil sendis al Johan proponon, indikante, ke ŝi ŝatas sendi porgazetan tekston pli koncizan kaj jam prespretan kune kun aparta peto ĝin publici. La sekvajn tagojn kelkaj el ni retroŝtis pri la temo por interkonsenti pri la finofara teksto.

S-ino *Marijke Lathouwers*, unu el la kunordigantoj de la studosemajnfinoj

de Esperanto Nederland, sciigis, ke ŝi ricevis de la ekzamenkomisiono, antaŭ nelonge malfondita, 300 eŭrojn, per kiuj ŝi intencas aĉeti kopimaŝinon favore al instruantoj, kiuj bezonas multobli-gi instrumaterialojn. Nia klubo, posedante sed ne plu uzante tian ilon, intencas ĝin donaci.

Komoraj Insuloj

Ĉi-vespere Joeri Molders prelegos pri sia vojaĝo al la *Komoraj Insuloj*.

Situantaj nordokcidente de Madagaskaro, kaj estintaj franca kolonio de 1887 ĝis 1975, la Komoroj konsistas el kvar insuloj, el kiuj unu estas ankoraŭ franca. La aliaj iĝis islama respubliko, kies loĝantaro nombras 700.000 personojn. Joeri vizitis la insulon plej grandan kaj plej okcidentan: *Grandan Komoron* (Grande Comore), kiu estas pli-malpli same granda kiel la nederlanda insulo *Tekselo*.



Sur la insulo

La tieaj flaŭro kaj faŭno similas al tiuj de Madagaskaro, kaj ekzistas diversaj unikaj specioj de plantoj kaj bestoj. Li montris multajn bildojn pri la naturo kaj pri personoj, kun kiuj li renkontiĝis, in-

ter ili la fondinto de la komora Esperanto-movado, *Ali Mze Mihidjahi*, kun kiu Joeri konatiĝis, leginte publicitan verkon de li, kaj poste korespondante kun li. Ali Mze lernis la lingvon en Madagaskaro kaj nuntempe instruas sur Granda Komoro per lernolibroj permanente kopiitaj.

Esperanto-movado

Sur la insulo, kie oni translokiĝas per komunaj taksioj, li vizitis kelkajn el la kvar tieaj Esperanto-kluboj, kies membraro nombras po kvin ĝis dek personojn. Krom la francan kaj araban, la oficialajn lingvojn, oni parolas ankaŭ popolan lingvon nomatan *Ŝikomori*, kiu estas miksaĵo de la araba, franca kaj svahila lingvoj.



Celakanto

En la nacia muzeo en *Moroni*, la ĉefurbo, troviĝas remburita ekzemplero de fiŝo, kiu nomiĝas *Celakanto* (coelacant), specio jam ekzistanta 400 milionojn da jaroj, kiun oni antaŭe konsideris estingiĝinta, sed de tempo al tempo tamen observadas je la orienta flanko de Afriko. La fiŝoj, kiuj povas atingi 80-jariĝon, pezas po 60 ĝis 80 kilogramojn kaj naĝas de 100 ĝis 300 metrojn profunde en la maro. Joeri parolis pri multaj interesaj faktoj kaj sciindaĵoj. Ĉu vi sciis, ekzemple, ke

ingredienoj por parfumo tutmonde uzata devenas plejparte de la Komoraj Insuloj? Li ankaŭ montris filmon pri festo de muzika asocio, kie li mem surpodie eĉ kantis Esperante.



Celakanto

Li kunportis kelkajn lokajn objektojn, inter ili kelkaj moneroj, monbiletoj, kelkaj malgrandaj lignoskulptaĵoj, kaj vanilaj guŝoj.

Eksteraj kontaktoj

Ĉar kelkaj komoraj esperantistoj suspektis, ke la fondinto de komora Esperanto-movado elpensis propran lingvon nenie parolatan krom sur Komoroj mem, Joeri estis vivanta pruvo, ke ankaŭ aliloke la lingvo vere ekzistas.



Joeri Smolders

Post la monro de bildoj kaj filmo la aŭskultantoj starigis multajn demandojn pri komoraj ĉiutagaĵoj kaj vivocirkonstancoj, pri kiuj Joeri povis rakonti multon. Ne nur pri la Komoraj Insuloj mem, sed ankaŭ pri travivaĵoj dum aliaj vojaĝoj. Resume, la vespero estis kaj agrabla kaj tre interesa.

4 oktobro 2007

ESTIS NIA ĉiujara *Malferma Vespero*. Kvankam du senkostaj lokaj gazetoj ĉifoje menciis nian varbotekston pri la vespero, kontraste al la du antaŭaj jaroj, venis nur du gastoj: *Nellie Klunder*, kursano de Wil kaj ankaŭ nova membro de nia klubo, kaj *Hero Heeroma*, kiu vizitas klubkunvenojn prefere nur dum tiaj vesperoj. Cetere ĉeestis ok personoj el niaj membroj.

Ni decidis, laŭ propono de Wil, sendi gratulkarton al *Wim Jansen*, kiu doktoriĝis ĉi-semajne. Post kaftrinkado ni prezentis nin unu al la aliaj. Tre diversaj montriĝis la motivoj eklerni Esperanton.

Wiebren ripetis sian inviton iam kune viziti *Gaasterland*, la regionon en kiu li loĝas. Ni volonte akceptas tiun proponon por la jaro 2008.

La tempon, kiu restis, ni uzis por solvi anagramojn iam surpaperigitajn de *Ni-za Kuiterman*. Estis tasko amuza sed pli malfacila ol ni supozis.

18 oktobro 2007

LA PROGRAMO pritraktis *instrumetojn*. Sed kiel kutime, ni unue parolis pri ĉiaj aliaj aferoj Esperantaj.

Ni ricevis komunikon de ges-oj *Hans* kaj *Pauline Reddingius* el Haren. Pro aĝo kaj pro la malbonaĵoj de tiu aĝo, ili jam delonge vizitas la klubkunvenojn nur tre malofte. Tial ili decidis ekŝiĝi el la klubo, sed resti abonantoj. Ili do daŭre estos ligitaj al la Groningen-a Esperanto-movado.

Wil estis en Zeeland ĉe *Tiny Nassenstein* kaj ŝia edzo. Tiny estas iama kursano de Wil. Tiam ili loĝis ankoraŭ en Francio. La vojaĝo al Zeeland daŭris same longe kiel vojaĝo al Francio, ne nur pro la distanco, sed ankaŭ pro maltrafaj korespondoj de trajnoj. En la komputil-ĉambro de familio Nassenstein estis bela foto de Esperanto-tulipo. Kiel akiri tian foton? Nu, simple el katalogo de florbokkultivisto!

Koos havis multajn komunikojn. Li tradukis pri la doktoriĝo de Wim Jansen anoncon, kiu aperos en la retejo de Internacia Esperanto-Instituto.

La disertacion *Woordvolgorde in het Esperanto – normen, taalgebruik en universaliala* oni povas aĉeti ĉe IEI kontraŭ 25,20 eŭroj.

Koos estis kune kun Wil en Oldenburg, kie okazis jarkunveno de *Esperanto-ligo de Malsupra Saksio*, kie krome estis interesaj prelegoj, interalie de naturmetoda kuracisto *Harald Schicke*, kiu rekomendas trinki multan bieron nature faritan. Dum la jarkunveno mem Wil kaj Koos iris eksteren, ĉar estis bela vetero.

Fine Koos informis nin pri projekto mezuri la radiuson de Tero. Esperanto estas la komuna lingvo en tiu projekto, kiu nomiĝas *Eratosteno*, laŭ la samnoma greka matematikisto, astronomo kaj filozofo.

Laŭ *Vikipedio*: Eratosteno kalkulis en la jaro 225 antaŭ Kristo la ĉirkaŭmezuron de Tero. La metodo: li sciis, ke la 21-an de junio en *Asuan* la suno staris tagmeze ekzakte vertikale kaj lumigis tie la fundon de la vilaĝa puto dum momen-

to. En Aleksandrio, 800 km pli norde, li mezuris la angulon de la sunradioj deviantaj de la vertikala linio kiel 1/50 de cirklo. Se 1/50 de cirklo estas 800 km, la tuta cirklo, do la ĉirkaŭmezuro de Tero estas 50-oble 800 = 40.000 km. La franco *Dominik Bertrand* proponas fari la saman mezuron kiel en Aleksandrio en multaj aliaj urboj. La dato por la unua eksperimento estas inter la 14-a kaj 16-a de novembro 2007.

Wiebren kunportis instrumaterialon el la jaroj 1971-1972. Tiam okazis la Esperanto-kurso de *Teleac* kun *Kees van Kooten* kaj *Wim de Bie*. Bedaŭrinde la filmbildoj ne plu ekzistas. Kelkaj klubanoj havas ankoraŭ la gramofondiskojn rilate al la kurso.



Poste Wil montris novajn kaj malnovajn instrumetodojn kaj –materialojn. La Cseh-metodo estas tre konata. Ĝi uzas nur Esperanton. Wil mem preferas ekspliki aferojn en la propra lingvo. Alia malfacilaĵo por lernantoj laŭ Cseh-kurso povus esti, ke ili ne havas lernolibron.

Gravaj aferoj estas lerni multajn vortojn kaj uzi la lingvon praktike. Wil havas multajn ludojn por lernigi vortojn. Preskaŭ la samajn ludojn ŝi uzas por paroligi la lernantojn.

“Sur la karto mi vidas ...”

Ni ludis per *Loco*: 24 demandoj, 24

respondoj, 24 ludŝtonoj kaj 24 lokoj en skatolo, ĉiu havas numeron. Se respondo 3 apartenas al demando 5, vi metu lud-ŝtonon 3 sur lokon 5. Aŭ inverse? Feliĉe Wil kunportis 2 skatolojn kun ŝtonoj, ni do provis ambaŭ.

Interesa estis skatolo kun simpla sed genia mekanismo. En la skatolo estas kartoj kun ĝusta kaj neĝusta respondoj. La mekanismo estas tiel, ke oni povas preni la karton nur, se oni scias la respondon ĝustan.

Krome, Wil montris al ni vidbendojn, komputilajn kompaktdiskojn kaj DVD-ojn. Fine ni parolis ankoraŭ pri retejo *lernu.net*, kiu estas tiel moderna, ke ĝi eĉ avertas lernontojn, ke ili eble ŝokiĝos pro la kursa enhavo.

1 novembro 2007

WIL KAJ INEKE ĉeestis en Nordwalde, Germanio, la Internacian Semajnfiron, kiun organizis la Esperanto-societo de *Münster* (kiu festis sian 100-jaran jubileon) kune kun Esperanto Nederland. Partoprenis 87 personoj, inter ili 37 el Nederlando. Estis agrabla kunveno kaj la partoprenantoj ĝuis interalie la prezentadojn de *Kuracistoj* (du kantistoj) kaj de *La Dorskorbuloj*.

Koos bitigos la kurson de Vilhelmo kaj Kornelio. Antaŭ pli ol 35 jaroj la nederlandaj televidilposedantoj povis sekvi Esperanto-kurson de *Teleac*, en kiu la s-roj *Kees van Kooten* kaj *Wim de Bie* alnaĝis la neloĝatan insulon *Mop* kaj poste kelktempe loĝis sur ĝi.

Wil anoncis je la interreta listo, ke la 13-an de decembro ni festos Zamenhof-tagon. Sekvos ankoraŭ detaloj.

Luit sciigas, ke Joseph en Bydgoszcz finfine ricevis la pli grandan parton de la sendita poŝmono.

Judoj en Nederlando

(Iam Wil ĉeestis prelegon de iu s-ro *Hazekamp* kaj faris notojn, kiujn ŝi tradukis en Esperanton).

En pluraj urboj kaj vilaĝoj estas specialaj tombejoj por judoj. En Amsterdam estas tombejo por *aŝkenazoj*, judoj kiuj devenas de Orient-Eŭropo. Pro la tieaj progromoj ili fuĝis okcidenten. En *Ouwerkerk aan de Amstel* estas tombejo por *sefardoj*, judoj kiuj devenas de Iberio. *Sefarad* signifas Hispanion kaj tiu nomo legeblas en la biblia libro *Obadja*. Pro la por judoj malfacila situacio en Hispanio multaj forlasis la landon kaj ekloĝis interalie en Antverpeno. Ĉirkaŭ 1590 la unuaj hispanaj kaj portugalaj judoj venis al Amsterdam. Ne nur tie la juda tombejo estas granda: tiu en *Ouwerkerk aan de Amstel* nombras 30.000 tombojn.

De 1927 la Groningen-aj judoj povas enterigi siajn mortintojn sur propra tombejo. La unua estis la *Jodenkamp* ĉe la *Boterdiep*, kaj alia ĉe la *Moesstraat*. Nuntempe oni trovas sian lastan ripozejon kontraŭ la urba tombejo *Selwerderhof*.

La judoj estis ne ĉiam ŝatataj. En Mezepoko ili devis surhavi flavan peceton sur la brusto aŭ flavan ĉapelon. Flavo estas la koloro de malamo. Ankaŭ *Luther* estis tre antisemitisma.

En 1553 estis la unua fojo, ke judo ricevis permeson ekloĝi en Groningen. Precipe en la periodo 1610-1620 oni

ne multe ĝenis la judojn, sed en 1629 la reformita sinodo de Groningen instigis, ke oni forpelu la judojn ĉar 'ili estas ĉiamdaŭra pesto'.



Moesstraat, Groningen

Al judoj estis malpermesate praktiki sian religion. Krome, ili ne havis civitanajn rajtojn, kaj multaj profesioj estis por ili nealireblaj. Ili povis okupiĝi nur pri rubo kaj pro tio oni parolis pri 'ĉifonjudoj'.

Ĉar ili ne bezonis agi laŭ la instrukcioj de la nova testamento ne estis por ili problemo fariĝi monkomercisto, profesio kiu konvenis ne al kristanoj.

En 1750 estis konstruita en la Folkingerstraat sinagogo, ĉirkaŭ kiu ekestis poste juda kvartalo. En 1900 loĝis en Groningen proksimume 3000 judoj. En la sama jaro la aŭstro *Herzel* pledis por *cionismo*: propra ŝtato por la juda popolo. Ankoraŭ en 1939 la Groningen-aj judoj konstruis sinagogon por junuloj, kvankam en tiu jaro en Germanio ekaktivis Hitler. Eĉ en la jaro 1940 la judoj en Groningen opiniis, ke ne necesis sin kaŝi, sed poste la plimulto de ili estis forkondukita. La malmultaj judoj, kiuj post la milito revenis al Groningen, ne estis favore akceptitaj.

Por okazigi diservon en sinagogo ĉeestu minimume dek viroj. Ili sidas

ĉirkaŭ granda pupitro en la mezo. La viroj rajtas tuŝi la *Toraon*, kiu estas la juda leĝorolvolaĵo, la kvin unuaj libroj de la Biblio. La virinoj sidas malantaŭ latbarilo. Ju pli kompakta estas la bariro, des pli ortodoksa estas la eklezio.

Kiam knabo estas dek-trijara, li iĝas religie plenkreska kaj rajtas fari legadon el la *Tora*. Dum la preĝoj la viroj surhavas preĝmantelon, kaj la kapoj estu kovrataj.



sinagogo en Groningen

Ĉar en Groningen ne plu estas buĉisto, kiu buĉas laŭ juda preskribo, oni devas alporti manĝaĵojn ekzemple el Amsterdam. Judoj manĝas bestojn nur purajn, kiel ekzemple remaĉuloj kun fenditaj hufoj, kokoj, anseroj kaj anasoj. Ili rajtas manĝi ankaŭ fiŝojn kun skvamoj kaj naĝiloj. Dum la preparado de manĝaĵoj oni devas sekvi plurajn regulojn. Oni estas judo, kiam oni estas naskita el juda patrino. Tamen ankaŭ ne-judo povas iĝi judo. Sed tio postulas longan studon kaj grandan adaptiĝon. Kial oni iĝas judo? Povus esti, ke oni volas aparteni al la 'Difavora popolo'.

15 novembro 2007

JOHAN BONVENIGIS speciale s-inon *Anneke Schouten* el Apeldoorn, nian gastprelegantinon.

Luit informis nin pri Joseph, kiu nun studas dum unu jaro en Bydgoszcz, Pollando, finance helpate de Luit kaj de aliaj nederlandaj esperantistoj. En *AD-weekend* Luit vidis artikolon nomitan *Van Afghaanse jas tot zitzak*, en kiu estas menciita Esperanton.

Ineke kunportis informojn pri la Esperanto-kurso de Wim Jansen en la universitato de Amsterdam, kaj knabo, studanta por iĝi ĵurnalisto, intervjuis Wil pri Esperanto kaj pri ŝi.

Tajvano

Anneke, kiu estas ne nur poetino, sed ankaŭ skulptisto, rakontis pri siaj vojaĝoj al Tajvano, insulo, kiu troviĝas sude de Japanio kaj norde de Filipinoj, kaj estas preskaŭ samgranda kiel Nederlando. La plej alta monto sur ĝi estas 5000 metrojn alta. La enloĝantoj devenas de Borneo, Mongolio kaj aliaj insuloj.



Anneke Schouten

Ŝi vizitis Tajvanon unuafoje en 1988 pro poezikongreso kaj gastloĝis ĉe Ba-haanoj kaj ĉe esperantistoj. Pro tio ŝi

povis sperti la ĉiutagan vivon de tajvanoj. En lernejo ŝi instruis la anglan kaj Esperanton.

Ŝi parolis pri kelkaj poemspecoj, inter ili *elfjes*, poemoj kiuj konsistas el dek unu vortoj, kaj pri *hajkoj*, mallongaj poemoj pri la naturo.

La tajvana lingvo estas speco de ĉina lingvo, kiu siavice konsistas el dek diversaj lingvaj specoj. En 2005 kaj 2007 Anneke vizitis Tajvanon denove. Ŝi ricevis de amikoj kaj konatoj diversajn ornamaĵojn, i.a. ĉeno el konkoj, kiu tre plaĉis al Ineke!



skulptaĵo far Anneke



teksaĵo el Tajvano

En la periodo de VOC la nederlandanoj estis dum 50 jaroj en Tajvano. La tajvanoj rememoras nin kiel popolon de kiu ili lernis multon. Tajvano estas memstara lando, kvankam ne deklarita memstara. Ni aŭdis pri 83-jaraĝa sinjorino, kiu ankoraŭ scias fari sen okulvitroj tre malfacilajn brodaĵojn. Aliaj virinoj teksas belaĵojn.

Anneke scias manĝi per bastonetoj, kiujn ŝi konservas en skatolo el eburo.

Foje ŝi vizitis tiean banejon kun varma, tre varma kaj eĉ varmega akvo, kio laŭ ŝi estis tre agraba. Ŝi intencas baldaŭ denove viziti la Esperanto-amikojn en Tajvano, bela lando, kiun la turistoj ankoraŭ ne malkovris.

Feriaj travivaĵoj

de Luit Staghouwer

EN AŬGUSTO mia edzino Monica kaj mi tendumis dum du semajnoj proksime al la Sud-Limburga vilaĝo Epen. Pli proksime eĉ al Geul, la rivero en Nederlando plej rapide fluanta. Dum niaj ferioj tiu kvalifiko ŝajnis iom troiga. Sed kvankam Geul en aŭgusto estis rivereto nur malvasta kaj malprofunda, sur la bordoj tamen estas pruvoj, ke la akvonivelo en ĝi estas kelkfoje multe pli alta. Mi volonte kredas, ke ĝi tiokaze ja meritas la titolon *la plej rapide fluanta rivero de Nederlando*.

Fungoj

Kompreneble ni regule promenis en tiu bela, montetara regiono. Dum unu el tiuj promenadoj ni vidis dekon da strangaj fungoj en la arbaro de Vijlen.



Geastro stria

Kvankam ni neniam antaŭe vidis tiajn fungojn, ni tamen sciis, ke ili estas terfungoj (geastroj). Fotoj de tiaj fungoj troviĝas en nia gvidlibro. Sed de terfungoj troviĝas en Nederlando proksi-

mume dudek specioj. Ili estas raraj. Poste mi eksciis, ke ni vidis la *Geastron strian* (Baretaardster).

Papilioj

Kelkajn horojn poste mi vidis strangan papilion, kiu troviĝas sur bela, flava floro. La papilio ŝajne serĉis nektaron, kaj unue mi vidis nur la nigrablankajn suprajn flugilojn. Poste la papilio iom disetendis ilin, kaj videblis la belaj ruĝaj flugiloj malsupraj. Ĉi tiu papilio pli-malpli similas al nokta papilio, kiun mi iam fotis hejme. Sed precipe diferencas la kapoj.



Euplagia kvarpunkta

Hejme ni eltrovis, ke ni vidis la tagaktivan noktan papilion *Euplagia kvarpunkta*. La nederlanda nomo estas *Spaanse vlag*. En Nederlando tiu specio troveblas nur en Sud-Limburgo.



Makaono

Ni vizitis dufoje la marnofosejon 't Rooth. Konato diris, ke tie troviĝas la bela *Makaono* (Koninginnepage). La unuan fojon ni ne vidis ĝin, sed semaj-

non poste ni vidis unu, du, duopon, denove duopon kaj ankoraŭ pliajn Markaonojn. Entute ni nombris dek kvin tiajn belajn papiliojn. Sed ili estas papilioj tre viglaj, kaj mi ne sukcesis ilin foti.

Ni vidis ankaŭ plurajn papiliojn de la specio *Zigeno filipendula* (Sintjansvlinder). Ankaŭ tiu papilio estas tag-aktiva nokta papilio. Montriĝis, ke pluraj el tiuj papilioj ĵus forlasis la kokonon en kiu el la krizalido kreskis papilio.

Rampinte el la kokono, la papilio povas flugi ne tuj. Unue ĝi ŝveligu la flugilojn.

Tial la freŝaj papilioj estas facile alireblaj. Kompreneble ni ne preterlasis tiun unikan ŝancon fari kelkajn fotojn.



Zigeno filipendula

ensenditaĵo

Karaj Samideanoj,

Mi estas Marko Pierkiel de Esperanto-klubo Amikeco en la urbo Andrychow, Pollando. Mi trovis vian retpaĝon.

Ni serĉas kontaktojn en la mondo. En nia klubo estas dek membroj.

nia retpaĝo: www.amikeco.andrychow.pl

Ĉu iu volus skribi al ni?

Korajn salutojn,
Marko



Malferma Tago

LA 27-A Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 24-an de novembro, allogis 110 vizitantojn el 18 landoj. Estis la dua fojo, ke la prelegoj de la Malferma Tago okazis en la nova konferencejo de la UEA-domo, sed la antaŭan fojon tie ankoraŭ mankis ŝovebla son-izola muro inter la ĉambroj *Kanado* kaj *Aŭstralio*, kiuj pli frue servis kiel ejo de Biblioteko *Hector Hodler*. Ĉi-foje ambaŭ ĉambroj estis kunigitaj en unu grandan salonon po du horojn komence kaj fine de la tago, sed dum tri horoj okazis en ili samtempe du paralelaj programoj.

Libroj kaj prelegoj


Komence la libroservisto *Ionel Onet* konatigis al la publiko la plej lastajn novaĵojn de la Esperanta merkato. La ĉefa gasto de la Tago estis la konata historiisto d-ro *Ulrich Lins*, kiu faris du prelegojn, 'Esperanto kiel lingvo kaj ideo en orienta Azio' kaj 'Mia alproksimiĝo al Zamenhof'. La dua prelego ligiĝis al lia redakta laboro super la sesa eldono de la klasika verko *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat, kiun UEA lanĉis en la UK en Jokohamo.

Alia historiisto, d-ro *Ziko van Dijk*, en sia ne malpli konata rolo de fakulo pri Esperanto-informado, elpaŝis kun sia plej freŝa libro *Informado praktike*. Unu el la plej elstaraj nuntempaj Esperanto-verkistoj, *Jorge Camacho*, pre-

zentis ne nur sian propran novan verkon, la poemaron *Eklipsas*, sed ankaŭ la volumon *La lingvo serena* kun kolektitaj poemoj kaj eseoj de la Nobelkandidato *Baldur Ragnarsson*, kaj la novan perio-daĵon *Beletra Almanako*, kies unua volumo ĵus aperis. Alispecan verkon, sian lernolibron *Esperanto per rekta metodo*, prezentis *Stano Marček*, kiu lanĉis ĝian nederlandan eldonon en la Malferma Tago.

Kvankam origine lanĉita antaŭ kelkaj jaroj, al multaj vizitantoj ankoraŭ nova estis ankaŭ la dvd-kurso *Esperanto - pasporto al la tuta mondo*, kiun prezentis *Lusi Harmon* kaj *Diana Babeck-Weichert*.

La vizitantoj povis konatiĝi ankaŭ kun ĝisnunaj kaj estontaj projektoj de E@I (Esperanto ĉe Interreto), i.a. la planata reta informportalo pri Esperanto, kaj kun la agado kaj celoj de la eŭropa Esperanto-partio *Eŭropo-Demokratio-Esperanto*.



Estrarro

La programon finis unuhora renkontiĝo kun estraranoj de UEA, dum kiu *Ranieri Clerici*, *Claude Nourmont*, *Barbara Pie-*

trzak kaj *Loes Demmendaal* respondis plej diversajn demandojn, i.a. pri la festado de la 100-jariĝo de UEA, Internacia Jaro de Lingvoj, UK en Roterdamo, kaj eksteraj rilatoj de UEA.

Furoraĵoj

Kun 12 ekzempleroj la reeldonita *Vivo de Zamenhof* festis la plej furora libro de la tago. Sekvis ĝin *Informado praktike* de Ziko van Dijk (11) kaj la bildstrio *Zamenhof bildrakonte* (10). Aliaj popularaj titoloj estis *Beletra Almanako* (7), *La lingvo serena* de Baldur Ragnarsson (6), *Fraŭlino Maitreyi* de Mircea Eliade (6) kaj la nederlanda eldono de *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček (5).

Entute la Libroservo de UEA vendis librojn kaj aliajn varojn por 2858 eŭroj.

Filmoj rete spekteblaj

Novaĵo estas, ke unuafoje eblas sekvi kelkajn progamerojn de la Malferma Tago virtuale. Filmis kaj enretigis ilin *Andrej Grigorjevskij*, kiu volontule prizorgas retajn servojn de UEA.

Pro teknikaj kialoj la filmoj ne povis aperi en la propra servilo de UEA, sed eblas vidi ilin ĉe

<http://video.google.com>, serĉante per 'Malferma Tago', aŭ per Libera Folio ĉe www.liberafolio.org/2007/malfermatago

La venonta Malferma Tago okazos sabaton, la 26-an de aprilo 2008, kaj estos dediĉita al la 100-a datreveno de la fondo de UEA.

fonto: www.eventoj.hu



Agrablajn Festotagojn
kaj

Feliĉan Novjaron



ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen